

KONTAKTO

numero 145(1995:1)

Naciaj renaskiĝoj: Ĉu danĝera ondo?

- La riskoj de artefarita fekundigo
- Ikonoj: la renaskiĝo de preskaŭ forgesita arto
- Meztulepramismo


Tiaŭanako

kie la Suno
havas sian Pordon



La krokodilo

jam maturas, laŭ
esploro de
Bernard Golden



Artefarita fekundigo: ĉu solvo...?	Ronaldo de Oliveira, Brazilo	2
Tatara tendo	Sabira Ståhlberg, Germanio	3
Naciaj renaskiĝoj: ĉu danĝera ondo?	Vladimir I. Ionesov, Rusio	4
Krucvorto (konkurso)	Fabrizio Pagliaroli, Italio	7
La bona ingo		7
Tri ekzemploj de Esperanta slango:	Bernard Golden, Hungario	8
Ikonoj en Rusio	Irina Aleksejeva, Rusio	10
Tiaŭanako – Ĉe la Pordo de l' Suno	Atilio Orellana Rojas, Argentino	10
Meztulepramismo	Olli; trad. Ilkka Santtila, Finnlando	12
Frato, mi venos	Ricardo Herrera Trigueros, Kostariko	13
Rapido	Irina Aleksejeva, Rusio	14
Surprizo malantaŭ la muro	Franĉjo Veuthey	14
Tentaklo		15
Mesaĝo por la edzo	Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo	15
Kiel verki per facila lingvo?		16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de
Tutmonda Esperantista Junulara
Organizo (TEJO), eldonata de
Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 145 (1995:1), 32-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (vodlegata por
blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
☎ fakso +31 10 436 17 51
e-poŝto: uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Martin Burkert (Germanio)

Zoran Ćirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Bernard Golden (Hungario)

Claus Günkel (Germanio)

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Ludmila kaj Piotr Malicy (Pollando)

Remigiusz Mielcarek (Kanado)

Atilio Orellana Rojas (Argentino)

Ōshō-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)

Claude Piron (Svislando)

Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)

Ilkka Santtila (Finnlando)

Sabira Ståhlberg (Germanio)

Zofef Truong (Usono)

Gratika elpretigo: Roy McCoy


Provelgado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaj
en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la
vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas
en la unua numero ĉiujare.

Anoncharifoj:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld.,
kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185
gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterkovrilaj
anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe
ripetita anonco (ne anonceto!) en
sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de
20%. Por movadaj instancoj: 50%
rabato. Varbantoj de ekstermovadaj
anoncoj ricevas maklerajon de 30% el
la prezo de la koncerna anonco. La
abontarifo varias laŭlande. Petu
informojn de la supra adreso.



enkonduko

Mi ĝojas saluti vin en la unua
numero de la kvara jarkolekto
sub mia redakto. Felician
novan jaron al vi ĉiuj!

Ni povas kune ĝoji, ke
ankaŭ la pasinta jaro estis
feliĉa – almenaŭ por
KONTAKTO. Mi verdire multe
timis, kio okazos, ĉar la
kotizo de simpla abono estis
plialtigita per tuta triono.
Tio ja estis necesa. Fakte jam
tiam, kiam *KONTAKTO* fariĝis
6-numera anstataŭ 4-numera.
Sed nur en 1994 plialtiĝis la
prezo.

Bonŝance la nombro de
simplaj abonoj retenis la
nivelon de la antaŭ jaro. Tio
ne estas la sola bona novaĵo.
Patronoj de *TEJO*, kiuj ankaŭ
ricevas nian kvaron, pli-
multigiĝis per kuvono. La
nombro de kolektivaj abonoj
preskaŭ triobligiĝis! Ankaŭ
kluboj komencas nun
malkovri la malmulte-
kostecon de kolektiva abono.

Koran dankon al vi ĉiuj
pro via pasintjara abono,
sed precipe pro la ĉi-jara!
Se vi ankoraŭ ne renovigis
la abonon, rapidu jam por ne
perdi la venontajn numerojn!

Kaj nun mi devas ĉesi
babilu, male mi riskas maltrafi
la aviadilon, kiu portos min al
mia Sunameriko (tio ne estis
ortografia eraro) por ferioj.
Ĝis!

Franĉjo

ĉu ne?

Artefarita fekundigo Ĉu solvo aŭ ŝtonpl

Ronaldo de Oliveira, Brazilo



La relative nova metodo reprezentas
esperon por pluraj geedzoj.
Nun ili povas sin prepari por ricevi la
delonge atenditan viziton: infanon.
Sed ĉu vere tiel facilas?

Artefarita fekundigo estas helpa sistemo por paroj, kiuj
ne povas ekhavi bebon. Pluraj aferoj povas malhelpi
la gravedigon: nefekundeco (sterileco) de unu el la paro,
malsanoj en la generaj organoj ktp.

Multfoje geedzoj volas havi sian propran filon, sed diversaj
problemoj seniluziigas ilin. Antaŭ nelonge sciencistoj anoncis,
ke ili kapablas krei homan vivon en vitrocilindro, per kolektado
de vira kaj virina generaj ĉeloj (spermatozooj kaj ovuloj). La
mondo gapis: Ĉu la moderna Frankenstein estos kreata?

Sed la vojo ne estas tiel facile trairebla. Tuj post la surprizego
de la unua anonco, alia grupo de sciencistoj avertis pri la
danĝeroj uzi tiun proceduron. Ekzemplo okazis en Brazilo.

Li havis nesufiĉan kvanton da spermatozooj por fekundigo
kaj en ŝia utero estis ses *miomoj* (= muskolaj tumoroj). Ambaŭ
arde deziris havi bebon. Tiam ili serĉis kuraciston. Post la solvo
de ŝia malsano, kaj ĉar la viro estis sterila, la kuracisto montris
al la geedzoj du eblajn vojojn: adopton de infano aŭ artefaritan
fekundigon. Ili elektis la duan.

Artefarita fekundigo paŝon post paŝo

1) Rikolto kaj selekto de spermatozooj.

Post la rikolto, la spermo restas en likvaĵo riĉa je glukozo, kiu similas al uteraj
kondiĉoj. Tiu substanco estas centrifugita. La "plej bonaj", taŭgaj spermatozooj,
restas en la supra parto de la vitrocilindro. Tiujn oni uzos en la fekundigo.

2) Preparo por la fekundigo.

Por plialtigi la ŝancojn de la virino gravediĝi, oni donas al ŝi drogojn por instigi
la ovol-produktadon. Kiam la ovulo alvenas al la ovoidukto, la kuracistoj jetas
sur ilin la selektitajn spermatozoojn. Okazas la fekundigo.

3) Je la 15-a tago post la fekundigo, la virino devas fari ekzamenon por scii, ĉu
ŝi estas graveda. Ŝi havas ĉirkaŭ 15% da ŝancoj fariĝi graveda en tiu unua fojo.



o:
ena vojo?



La ŝancoj de sukceso pri artefarita gravediĝo, je la unua fojo, estas de 15 procentoj. Kioma estas la averaĝo de homa eraro pri la manipulado de la genera materialo en laboratorioj?

Naŭ monatojn ili sin preparis por ricevi la bebon, sed kiam li finfine naskiĝis... ŝoko! La infano estis bluokula kaj liaj haroj milde flavkoloraj, dum la paro havis nigran haŭtkoloron!

Ĝis la unua vivojaro la bebo restis sub la zorgoj de kuzino, ĉar la gepatroj lin rifuzis. La patrino ekhavis hipertensian krizon kaj devis restadi en la hospitalo dek tagojn; la patro komencis drinki kaj fumi: "Mi ne kuraĝas alproksimiĝi. Mi imagis filon samkoloran kiel mi, ne blankulon."

"Iam vendisto avertis min esti zorgema, ĉar nigrulo babiladas kun mia filo. Tiu nigrulo estis mia edzo", diris la patrino, kiu eĉ tinkturis sian hararon blonde.

La paro translokiĝis 12 fojojn, ne eltenante suspektojn de la najbaroj. Li eĉ multfoje kverelis kun aliuloj, kiam tiuj duondiris, ke ŝi perfidis lin. Nun ili jure postulas monkompenson de la laboratorio pri ĝia eraro kaj ankaŭ psikiatran flegadon por la infano.

Kurioze, antaŭ kelkaj monatoj Brazilo plonĝis en diskuto pri televida novelo, en kies intrigo riĉulo senprave akuzis sian negran dungiton kiel ŝteliston. Diversaj reprezentantoj de la t.n. Negra Movado heroldis kontraŭ la sceno.



Du mulaoj kaj kamparano (1)

Iam du mulaoj* kaj kamparano iris kune laŭ vojo. Ili iris dum longa tempo, kaj fine haltis ĉe gastejo. Tie ili kuiris botka*. Kiam la botka pretis, ili dividis ĝin en tri partojn. Ĉiu fosis truon en la mezon de sia botka, kaj metis el potu fluan buteron en la truon, kaj tiel ekmanĝis.

Tiam unu mulo prenis sian kuleron kaj diris:

- La vojo de religio ti-i-iel montriĝas al mi!

Kaj li prenis per la kulero buteron el la mezo de sia botka kaj ĵetis tion kontraŭ sin mem.

La alia mulo rigardis momenton kaj diris:

- La muel*-ilo de niaj prapatroj ti-i-iel turniĝas!

Kaj li prenis per la kulero buteron el la mezo de sia botka, kaj faligis tion en cirklo sur la teleron.

La kamparano rigardis kaj diris:

- Nu, miaj karaj mulaoj, la mondo laŭ-dire ĉiam ŝanĝiĝas. La estonta mondo ti-i-iel turniĝas!

Kaj li prenis la poton, elverŝis la reston de la butero sur sian botkan, kaj rapide per la kulero miksis kaj ĉion formanĝis en unu fojo.

Malĝoja mulo

Iu fama mulo mortis. Li post-lasis bonan mantelon el pelto*, tre uzeblan dum la vintro malvarma. Tiun mantelon li volis doni al iu amiko, ankaŭ mulo.

Kiam la familianoj de la mortinto alvenis al la mulo amika, ili diris:

- Via amiko mortis, estimata mulo, kaj li lasis al vi mantelon!

La mulo unue malĝoj-iĝis. Poste li diris:

- Karaj, mi estas tre malĝoja

aŭdi de vi, ke mia amiko mortis. Sed kiam vi diras, ke li lasis al mi mantelon, mi tuj reĝojiĝas!



botka: manĝaĵo el greno muelita, tre ŝatata de tataroj

mueli: dis-er-igi, dispecigi grenon

mulo: speco de Islama pastro

pelto: besta haŭto kun la haroj speciale preparita por fari veston

FRANCJO 94

"La paro rajtas jure postuli monkompenson, sed ilia konduto estas rasista. Oni devas pensi, ke se blankhaŭta paro rifuzas nigran filon, ili estus krucumitaj" diras s-ro Jair Krische, prezidanto de la Movado pri Justeco kaj Homaj Rajtoj en la ŝtato Rio Grande do Sul, kie okazis la miskompreno.

La konfuzo estis granda, kaj inter multaj ambaŭflankaj akuzoj oni diras, ke la bebo, hodiaŭ 4-jara, similas al la biokemiisto posedanta la laboratorion, kiu cedis la spermatozoojn. La historio similas tiun okazintan en 1992 en Usono, kiam kuracisto Cecil Jacobson estis kondamnita ĉar li uzis sian propran spermon por fekundigi siajn pacientinojn.

En Brazilo estas tiel, ke leĝoj por adoptado pli malhelpas ol helpas. Kaj, onidire, ni vivas en lando, kie rasismo ne ekzistas. □

Naciaj renaskiĝoj

D-ro Vladimir I. Ionesov, Ruslando

La distinga specifeco de nia tempo estas trafinta multajn regionojn de la mondo, nome la ondo de suvereniĝo kaj nacia renaskiĝo. Tiu ĉi ondo povas esti komparata kun "la naŭa ondego" de la moderna historio, rezulte de kiu detruigis la muroj de la malvarma milito kaj estis reviziita la politika mapo de la mondo. Tamen, la pontoj de interkompreniĝo inter Oriento kaj Okcidento, kaj Nordo kaj Sudo ĝis nun atendas sian konstruon. La nova situacio starigis novajn demandojn laŭ "lastaj interpelacioj de la estado": kiel distingi la veran suverenecon de la falsa, ŝajna sendependeco? Kiel, detruante la murojn de la pasinteco, ne trafi sub iliajn ruinojn? Kiel liberiĝi de etno-separatismo kaj kultura ekspansiismo?


Malgraŭ tuta diverseco en la demandoj, ili ĉiuj apogas sin sur la konata vero de la vivo: ni mem faras nian historion, ni vivas sur unu planedo, ni havas unu Pasintecan, unu Estontecan kaj ni solaj estas iliaj kreantoj.

La ideo de la nacia renaskiĝo ĉiam pli aktive enirigas en la orbiton de la politikaj bataloj la historiajn sciencojn. La historio de tiu aŭ alia popolo, ĝia etnogenezo kaj kultura heredaĵo ĉiam estis la forta rimedo de la sociala-psikologia influo sur la homo. Ekzemplo de la ekstrema formo de tiu ĉi influo estas la nazia mito pri "la aŭtentaj arianoj", estiĝinta kerno de la oficiala idelologio de la hitlera faŝismo. Hodiaŭ, sub la standardo de la batalo por "historia justeco", al la socio oni denove nemalofte altrudas la kvazaŭ kulturajn valorojn, formantajn la filozofion de la etno-separatismo kaj naciismo. Necesas ekscipovi estingi la interetnan intensecon jam je la unua, ĝerma stadio de ĝia evoluo – en la stadio de la demagogaj rezonadoj laŭ la tempo pri la aparta kultura-historia privilegio de tiu aŭ alia etno. Oni ne devas permesi, ke la historia heredaĵo

de unu popolo estu direktata kontraŭ la historia heredaĵo de alia popolo. Kompreneble, en la bazo de ĉiu interetna kontraŭstaro, finfine kuŝas la socialaj-ekonomiaj kaŭzoj – malalta vivnivelo, sociala nedifiniteco, politika krizo, ideologia konfuzo k.a. Ĉiuj tiuj kaŭzoj plej rimarkeble riveliĝas en la transira-apudlima zono de la historia evoluo, en kiun hodiaŭ trafis la ŝtatoj de la eksa socialisma landaro. Ĝuste la krizo de la sociala vivo, apudlimeco kaj embaraseco de la situacio, plej ofte, puŝas la homojn al la senpripensa forkuro en la pasintecan, la serĉado de "historia malamiko de sia popolo", al la kvitiĝado kun la peniga estanteco. Kaj ĝuste tiu ĉi panika konfuziĝo hodiaŭ dominas en la plimulto el la ŝtatoj de eksa Sovetunio.

Nacia renaskiĝo en Centra Azio

Centra Azio por la historiistoj ĉiam estis la unika subĉiela muzeo kaj la ekzemplo de la kreanta historia kunloĝado de plej diversaj etnoj, kulturoj, lingvoj kaj kredoj. Tamen tiu ĉi unueco, kiu antaŭ nelonge ŝajnis nerompebla, hodiaŭ iĝis infektita per la viruso de naciismo kaj perforto. En la kondiĉoj de dispartigo kaj totala ekonomia krizo, la faktoro de la multetna kunloĝado kaj internaciismo komencis rapide transformiĝi en la faktoron de interetna



La potista ceramika pokalo de la bronza epoko (maldekstre) kaj la islama teologia klerigejo Ŝer-Dor en Samarkando (dekstre) estas klaraj ekzemploj de la konstruiva kaj neelĉerpebla homa strebo al la belo, harmonio kaj perfekteco.

Vitalii Gračenko

Ĉu danĝera ondo?



Marianne Vermeas

malamikeco kaj agresio. Ĉiu popolo komencis, por tiel diri, tiri la litkovrilon al sia flanko kaj spontanee ekis pligrandiĝi la reciprokaj kulpigoj kaj etno-kultura disdivido. Ekflaminte du jarojn antaŭe, la civila milito en Taĝikistano jam forportis pli ol 300 000 el la homaj vivoj kaj naskis ĉirkaŭ unu milionon da rifuĝintoj, kiuj hodiaŭ serĉas saviĝon kaj rifuĝon en Rusio, Ukrainio, Afganio, Kazaĥio, Uzbekio, Kirgizio, Pakistano.

Necesas diri, ke ĉiuj centraaziaj respublikoj kaj iliaj nunaj ŝtataj limoj estis formitaj per la soveta potenco, rezulte de la programo por nacia dispartigo de la centraaziaj etnoj realigata en la 1920-aj jaroj laŭ la iniciato de V.I. Lenin. Kaj eĉ se la establitaj limoj estis tre formalecaj kaj etne amorfaj, ĝuste ili unuafoje fiksis la ŝtatecon por la plej grandaj centraaziaj etnoj – kvankam rememori pri tio hodiaŭ estas ne laŭmode.

Ĝis la jaro 1917 la centraaziaj popoloj eniris la duonfeŭdajn ŝtatojn: Ĥiva- , Buĥara- kaj Kokand-ĥanlandoj, kiuj estis en vasala dependeco de la rusa imperio. Kompreneble, ke la disfalo de la soveta sistemo sekvigis la danĝeron de rompo de la ŝtataj limoj konstruitaj per ĝi . La danĝero iĝis tre serioza de post la eventoj en Fergana (Uzbekio, 1989), en Oŝ (Kirgizio, 1990) kaj en Taĝikio (1991-). Tiu ĉi danĝero kreskas ankaŭ pro tio, ke la nunaj administraj-ŝtataj limoj de la centraaziaj respublikoj multkaze ne koincidas kun etnaj kaj lingvaj limoj. Ekzemple, en Samarkando (Uzbekio) dominas la taĝiklingva loĝantaro, en kelkaj distriktoj de la provincoj Leninabad (Taĝikio) kaj Oŝ (Kirgizio) la uzbekoj havas plimulton; en Bastanlyk-distrikto (Uzbekio), la granda parto de loĝantaro estas kazaĥoj ktp. La pliprofundigo de la ekonomia krizo kaj la interŝtata malintegriĝo kreas en tiuj ĉi kondiĉoj tian objektivan situacion, kiu ofte estas uzata por subjektivaj historiaj falsadoj favore al la nacipatriotaj fortoj. Ĉio ĉi kunpuŝigas inter si ne nur la etnojn, sed ankaŭ la epokojn, kulturojn, lingvojn, monumentojn, historiajn personojn, religiajn ideojn k.a. Bedaŭrinde, tiu ĉi stranga batalo jam ekis aperi sur la paĝoj de la novaj lernolibroj pri la historio de la centraaziaj popoloj. En ili ĉiu respubliko foje provas elstarigi ekskluzive sian popolon kiel la ĉefan kreinton de la centraazia kultura heredaĵo.

Tamen la kultura heredaĵo de unu etno estas ĉiam reflektado de ĝia dialogo kun aliaj etnoj. La kulturo de unu etno ĉiam naskiĝas en la punkto de ĝia intertuŝiĝo kun aliaj etno-kulturoj. Tio estas ankoraŭ pli justa por Centra Azio, kie la kultura heredaĵo estas kunkreado, verko de la kulturaj tradicioj kaj spirita sperto de diversaj popoloj. Oni povas eĉ diri, ke en la kondiĉoj de Centra Azio la historio kaj kultura heredaĵo de unu etno kreskas per la historio kaj kultura heredaĵo de aliaj etnoj. Ĝuste en tiu ĉi kunkreado enestas la krea, humanisma senco de la kulturo. Tiu, kiu hodiaŭ provas dividi la centraaziajn popolojn laŭ iliaj etnaj, lingvaj, religiaj, kulturaj-historiaj specifaĵoj, riskas makuli siajn manojn per sango, tranĉante la vivan organismon je ĝiaj partoj.

(Daŭrigo paĝoturne)

Inter paradokso kaj danĝero


Kiel montris la moderna sperto de la politika dispartigo de la ekssovetiaj respublikoj, la ŝtata-politika suvereniĝo ne devas aliformiĝi en kultura-genetikan suvereniĝon. Sur la ondo de la suvereniĝo ne malofte kiel suverena estas deklarata ankaŭ la historio de la popolo mem. Sed tio jam estas aventuro. Ĉar tiam la suvereniĝo komencas esti nur senenhava moda frazo, memstara valoro, incitanta la historion de unu popolo kontraŭ la historio de aliaj popoloj. Oni ne devas fari el la historio la atutan karton por altrudo al la socio de kvazaŭ-patriotaj valoroj naskiĝantaj per la politikaj ambicioj de la naciistoj. Ja kiu serĉas en la historio nur iujn ekskluzivajn modernajn politikajn dividendojn por sia etno, finfine restas kun nenio. Ĉar la riĉeco de ĉiu etna kulturo determiniĝas per la riĉeco de ĝiaj ligoj kun siaj najbaroj, kun la ekstera mondo. La etno apartiganta sian kulturon de la kulturo de siaj najbaroj hakas la branĉegon sur kiu ĝi mem sidas. Malgraŭ tio, la paradokso, absurdo kaj danĝero de la nuntempa stato de la interretnaj rilatoj restas esti nia hodiaŭa realo.



Marianne Vermaats

Centraazia orienta bazaro – tradicia renkontiĝejo de homoj kun diversaj nacioj, religioj, okupoj kaj mondkonceptoj.

La antikva centra placo Registan (15a-17a jc) de Samarkando estas atestanto de multaj historiaj eventoj.



Leonid Peluŝkov


Paradokso de la nuntempa situacio en la evoluo de la interretnaj rilatoj konsistas en tio, ke ju malpli da vera suvereneco posedas la ŝtato, des pli laŭte ĝi deklaras pri sia suvereneco kaj des pli aktive ĝi naskas propagandcelajn mitojn. La absurdeco de la nuntempa situacio konsistas en tio, ke la modernan suverenecon la politikistoj ofte provas "planti" nur per manoj de la pasinteco, per transŝovado de la tiel nomataj "historiaj suverenecoj" en la nuntempon. Tio estas farata pere de unuetna uzurpado de la multnacia kultura heredaĵo. La danĝero de la nuntempa situacio kuŝas en tio, ke la moderna demarkado de la kultura heredaĵo (kaj ankaŭ de la historia memoro!) fariĝas ofte senkompromisa batalo por la etno-monopola posedo de tiu ĉi heredaĵo.

Historie senperspektivas kaj politike danĝeras dividi la kulture heredaĵon de la antikveco en la nunaj etnaj limoj. La historio, kvazaŭ antaŭvidinte la nuntempan

situation, pene laboris regule miksante la etno-kulturajn unuiĝojn de Centra Azio por anticipe averti la posteulojn ne allasi la fratmortigan dividon. Tamen, al la nunaj politikistoj verŝajne sufiĉas nek fortoj, nek volo, nek saĝo por enpenetri en tiun ĉi evidentan historian veron.

Samtempe, la historio daŭrigas doni al ni ĉiuj avertajn lecionojn. Unu el ili estas, ke la transigo de la politika batalo en la sferon de la historia pasinteco finiĝas per tio, ke la pasinteco komencas venĝi al la estanteco. Kaj pri tio ĉi ankoraŭfoje rememorigas al ni la hodiaŭa sangoverŝo en Kazaĥio, Taĝikio, Balkano... Kiu sekvos? □

D-ro Vladimir I. Ionesov, supera scienca esploristo de la Instituto pri Arkeologio ĉe la Akademio de Sciencoj de Uzbekio. Lekcias en la Instituto de Artoj kaj Kulturo de Samara, Ruslando.




Arkeologiaj eltrovaĵoj estas la plej grava kaj objektiva fonto de la historia rekonstruo de la etna-kultura interagado de la centraaziaj popoloj. Sur la foto videblas la aŭtoro kun unikaj sud-uzbekaj arkeologiaj artefaktoj de la 2-a jarmilo a.K., elfositaj de li, kiuj atestas pri la profundaj radikoj de la historia kunvivado kaj kunkreado de la centraaziaj etnoj.

Vitali Graĉenکو

Krucvorto

Fabrizio Pagliaroli, Italio

Sendu vian solvon al nia redakto antaŭ la 31-a de marto 1995. Vi povas gajni la interesegan libron *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo!*



HORIZONTALE

1. Partoprenanto en kunvenego
8. Kolekto (s.f. = *sen finaĵo*)
9. Parto de la brako
10. Florkolora, nomo de virino
12. Ekbatilo kontraŭ iu (s.f.)
13. Puŝi spiran aeron el la buŝo
15. Maniero por esprimi la belon
17. Virina antaŭnomo (s.f.)
20. Meblo, sur kiu oni sidas (s.f.)
21. Difina artikolo
22. Grandkvante
24. Malsupra parto de io (s.f.)
25. Ankaŭ ne
26. Liberigi de danĝero aŭ morto
27. Nomo de la 21-a E-litero
29. Vojo en urbo (s.f.)
30. Malmola korpoparto
31. Varma trinkaĵo

VERTIKALE

1. Ligno bruligita
2. Elstara parto de vizaĝo
3. Atentinda
4. Sentanta deziron pri io
5. Ne plu ema manĝi
6. Neorganizita grupo (PIV)
7. Malluma parto de la tago (s.f.)
11. Venas post "pli"
14. Muŝo aŭ simila besto (s.f.)
16. Fariĝi en iu loko aŭ tempo
18. Maljes
19. Grava grenaĵo ĉiutaga (s.f.)
21. Purigo per akvo (s.f.)
22. Ĝin oni spiras
23. Aro de ses personoj aŭ aferoj
24. Ektuŝege per tuja, forta movo
26. Sennacieca Asocio Tutmonda
28. Finaĵo montranta estontecon

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

ABONTARIFO 1995	
Aŭstralio 30 dolaroj	Francio 125 frankoj
Aŭstrio 245 ŝilingoj	Germanio 37 markoj
Belgio 765 frankoj	Hispanio 2100 pesetoj
Brazilo 20 guldenoj	Israelo 32 guldenoj
Britio 15 pundoj	Italio 30000 liroj
Danio 150 kronoj	Japanio 2880 enoj
Finnlando 115 markoj	Kanado 29 dolaroj
Nederlando 41 guldenoj	
Norvegio 150 kronoj	
Pollando 20 guldenoj	
Portugallio 2500 eskudoj	
Svedio 170 kronoj	
Svislando 31 frankoj	
Usono 22 dolaroj	

TEJO lotumos valorajn premiojn inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!

anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

19-jara katolika monaĥo deziras ricevi E-publikaĵojn por siaj lernantoj kaj mem korespondi tutmonde, sendepende de religioj. Fray Martín de Jesús, Misióŝn Reina de los Ángeles, San José de la Montaña - Heredia, Kostariko.

Kongreso de Gente-Duonigitaj Urboj de la 21-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 1995. Petu pliajn informojn ĉe Esperanto-rondo de Bielo, Poŝtkesto 3163, CH-2502 Bielo-3, Svislando. ☎ +41 32 22 00 65

Ankaŭ esperantistaj grafikaj artistoj partoprenu konkurson "Homaj bildoj", kun ĉefpremio de 10 000 kaj aliajn de ĉirkaŭ 3 000 germanaj markoj! Petu detalojn de E-grupo Kronach, Armin Grötzner, Giessübel 36, DE-96317 Kronach, Germanio.

Mi interŝanĝas hispanajn uzitajn poŝtmarkojn kontraŭ aliaj vialandaj. Juan M. Alonso de Arcos, Alameda de Capuchinos 8-5º-B, ES-29014 Málaga, Hispanio.

La bona ingo



Gavialo

Aligato

Krokodilo

Tri ekzemploj de Esperanta slango: *lacerto, bakfiŝo, gaĝo*

Bernard Golden esploras pri la slanga lingvonivelo en Esperanto

En etnolingvoj vortoj kaj esprimoj klasifikitaj kiel slango originas el la lingvouzo de apartaj sociaj tavoloj kaj komuninteresaj grupoj kiel metiistoj, studentoj, soldatoj, sportistoj, krimuloj ks. Slango estas tre malstabla parto de la lingvo pro sia efemereco. La membroj de la menciitaj grupoj interagadas nur dum limigita tempo; poste venas novaj homoj kun novaj kutimoj, kaj la slango de la antaŭa generacio rapide elmodiĝas, cedante sian lokon al pli aktuale elvokivaj vortoj kaj esprimoj. En la esperantlingva komunumo ja ekzistas homoj ligitaj per simileco de edukiteco, okupoj kaj ŝatokupoj, laborfakoj kaj ankaŭ politikaj kaj religiaj sintenoj. Tamen, la plejmulto ne agas konstante en siaj apartaj medioj dum la tuta jaro kun la escepto de tiuj, kiuj estas dungitaj en esperantistaj organizaĵoj aŭ entreprenoj. Plejofte ili renkontiĝas nur okaze de konferencoj, kongresoj kaj alispecaj relative mallongdaŭraj aranĝoj. Pro tio estas malfacile por slangaj vortoj enradikiĝi en la parola lingvouzo, disvastiĝi for de la centro de origino, kaj eventuale akiri ĝeneralan popularecon, akcepton kaj uzadon. Alia procedo iniciata kaj disvastigita slangajn vortojn kaj esprimojn estas per la skriba lingvo, plej ofte en fikciaj verkoj, kies legantaro estas pli multenombra ol la partoprenantoj en la renkontiĝoj menciitaj ĉi-supre. Ĉiuokaze, cirkonstancoj, en kiuj la parola lingvo estas la primara aŭ la sola maniero interkomunikiĝi, provizas la plej fruktodonan terenon por observado kaj registrado de la fenomeno de estiĝo kaj enradikiĝo de slango en Esperanto.

Pioniris en tiu esplorado István Szerdahelyi, kiu priskribis trajtojn de la lingvouzo de membroj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), okaze de ilia 26-a kongreso en Graz en 1970⁽¹⁾. La hungara esperantologo rimarkis, ke la junularo havas specifan lingvaĵon, kiu diferencas pro siaj propraj karakterizaĵoj, de ĉiuj aliaj stiloj. Altiris lian atenton la tendenco uzi sintezajn esprimojn kiel "iru vespermanĝejen" (anstataŭ "iru al la vespermanĝejo"), kaj "invitatas" (anstataŭ "estas invitataj"). Ankaŭ la pli ofta uzo de la sufiksoj "-um" kaj "-aĵ", kiuj havas necertan kaj elastan signifon, ebligas esprimon de ŝercaj, ironiecaj kaj sekretecaj nuancoj: "geumado" (rilato inter diverseksaj junuloj); "kotoĉaĵoj" (ktp-aĵoj, kromaĵoj). Ironio kaj ŝercemo esprimiĝas per nekutima uzado de la prefikso "mal-" por krei sinonimon de jam ekzistanta vorto; tiel, anstataŭ la tute konvena kaj neambigua vorto "jes", oni enkondukas la formon "malne". Ankaŭ Jean Thierry, la sekretario de la Akademio de Esperanto, komentas pri niveloj de lingvouzo karakterizataj per "aŭdacaj metaforoj aŭ elipsoj", kaj li prezentas kiel simptomojn de estiĝantaj "slangoj" en Esperanto vortojn kiel "krokodilil" (paroli nacilingve en Esperantio) kaj "Kiomas?" (Kioma horo estas?)⁽²⁾.

Laŭ mia scio ekzistis nur unu provo registri tiun tre efemeran parton de la Esperanta leksiko. Temas pri *Slanga Vortaro de Esperanto* (SVE), kies kompiladon iniciatis Leif Gunnar Nordenstorm sur la paĝoj de la revueto *KTP* ekde aŭgusto 1982. Slangaj vortoj kaj esprimoj estis listigitaj kun klarigoj kaj fontindikoj. Bedaŭrinde, tiu kompilado estis tre mallongdaŭra, kaj post

Nordenstorm neniu plu-portis la torĉon. Krom kontribui al SVE, mi faras mian propran kolektaĵon de



Esperantaj slangaj vortoj aperantaj plejparte en publikigitaj verkoj. En la sekvaj sekcioj mi pritraktos la estiĝon kaj uzadon de tri slangaj vortoj, kiuj miaopinie estas sufiĉe utilaj por ne meriti la etiketon de efemereco. Fakte, kiel mi montris per la historio de "krokodilil" en la lasta sekcio, tiuj vortoj havas ŝancon ŝanĝi sian statuson de slango kaj eniri en la normlingvan parton de la Esperanta leksiko.

Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

“Lacerto” – la plej nova membro de la reptilia familio

Antaŭ du jardekoj aperis en *KONTAKTO* (n-ro 36, 1972:3, p. 19) difinoj formulitaj de Henri Vatré pri tipoj de esperantistoj renkonteblaj en kongresoj, kies konduto estas riproĉebla, ĉar ili ne ĉiam parolas en Esperanto. Krom la bone konata “krokodilo”, kiu “sin esprimas nacilingve en esperantista medio”, troviĝas la sekvaj malpli bone konataj tipoj: “kajmano” uzas alian nacilingvon ol tiun de la enlandanoj, ekzemple la anglan inter francaj esperantistoj; “aligatoro” dialogas en nacilingvo negepatra por ambaŭ parolantoj, ekzemple dano kaj ruso konversacias hispane dum Esperanto-kongreso; “gavialo” parolas lingvon nekomprenatan de la ĉeestantoj, ekzemple Esperanton inter etnolingvuloj.

Al tiuj verdaj reptilioj mi aldonas ankoraŭ unu, “lacerto”, kiun mi elpensis en 1980, kiam budapeŝta esperantisto, suferanta pro progresiva minuskomplekso, fine mense misekvilibriĝis kaj komencis polemiki kun mi en la hungara, kiu ne estas mia gepatra lingvo. Esperantisto fariĝas lacerto, kiam, pro diversaj psikaj perturboj, li senvole perdas la kapablon esprimi sin en Esperanto. Jen mia konciza difino.

Lacerto – esperantisto, kiu sub cirkonstancoj de emocia streso, kolero, timo aŭ honto, aŭ simple pro mensa laceco, uzas sian gepatran lingvon skribe aŭ parole por komunikigi kun homoj, kies nacia lingvo estas alia, do senkonsidere, ĉu ili komprenas lin aŭ ne.

Tre ofta kaŭzo de lacertiĝo de esperantisto estas kritikoj, kiujn faras aliaj esperantistoj pri la erara lingvouzo de la koncernulo. Alia aspekto de la neracia konduto de lacertoj estas ilia kutimo pli kaj pli laŭte paroli en sia gepatra lingvo, kvazaŭ tio helpus ĝian komprenon fare de alilingvuloj.

“Bakfiŝo”: frandaĵo por la palato kaj la okuloj

Unu el la slangaĵoj, kiun mi antaŭ longe proponis por la *Slanga Vortaro de Esperanto*, estas “bakfiŝo”. Tiu vorto, en la neasimilita formo “Backfisch”, troviĝas en la romano *La nokto de la ezoko* (1992), verkita de Serĝo Elgo (peŭdonimo de Georges Lagrange). La glosa de la aŭtoro misinformas pri la signifo: “germanlingva esprimo, laŭvorte ‘retrofiŝo’, t.e. fiŝeto, kiun oni rejetas al la maro, ĉar ĝi estas ankoraŭ tro malgranda. Ĝerca esprimo por nomi tro junajn junulinojn ankoraŭ ne sufiĉe virinajn” (p. 171). Plej probable la unua esperantisto, kiu uzis “bakfiŝo”, estis Raymond Schwartz en sia romano *Kiel akvo de l’rivero* (1963). Ĝia deveno estas la germana vorto “Backfisch”, kiu, krom signifi bakitan fiŝon, estas uzata ankaŭ figure. Jen kiel Schwartz glosas ĝin: “Germ. ‘Backfisch’ = bakfiŝo, sed ni diras, pli ĝuste, fritita fiŝo. La plej forta senco de ‘Backfisch’ en la germana lingvouzo estas ‘plaĉaspekta fraŭlineto, ĝenerale inter 14 kaj 17 jaroj’” (p. 142). “Bakfiŝo”, do, tre bone konvenas kiel sinonimo de “adoleskantino”, “juna fraŭlino” kaj “dekelkjarulino”.

“Gaĝo” – ne-verdulo ekster la E-lingvokomunumo

Eble la unua Esperanta vorto bazita sur ciganlingva etimo estas “gaĝo”. Ciganoj uzas ĝin kun la signifo “ne-cigano”, same kiel la hebredevena vorto “gojo” signifas “ne-judo”. Tiuj du vortoj ne estas tradukeblaj al etnolingvoj, krom se ili posedas analogan vorton por priskribi iun, kiu ne apartenas al la sama etna grupo. Manke de speciala vorto, etnolingvoj devas uzi esprimojn kiel “ne-anglo”, “ne-ruso” ks. Same kiel en la kazo de “gojo”, ankaŭ “gaĝo” estas uzata slange en Esperantujo por nomi ne-esperantiston. Ĝi estas tre oportuna esprim-maniero pro sia koncizeco por diferencigi la verdulojn aktivajn ene de la diasporo situanta E-parolkomunumo, disde ĉiuj eksteruloj kaj alilingvanoj.

Mi proponas uzon de la radiko “gaĝ-” por ebligi esprimon de ankoraŭ unu koncepto: “paroli en nacia lingvo”, “paroli etnolingve”, “ne paroli en Esperanto”. En tiu ĉi kazo, ne estas eble diri “krokodili”, ĉar tiu ĉi verbo rilatas specife al parolado de nacia lingvo en esperantista medio. Kiam temas pri interrilatoj kun ne-esperantistoj, estas evidente, ke oni nepre devas utiligi iliajn lingvojn; sekve inter gaĝoj oni parolu gaĝe. Kiu parolas Esperante inter gaĝoj estas gavialo!

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 paĝoj, tole bindita, ilustrita.
Prezo: 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



La krokodilo finfine maturiĝis

Ekzameno de la historio de la orgine slanga vorto “krokodili” montras, kiel ŝanĝiĝis ĝia lingvonivelo. Kvankam ĝi estis ekzita en la 1930-aj jaroj, ĝi diferencas disde aliaj vortoj sur tiu lingvonivelo, ĉar ĝi ne fariĝis efemera. Efektive, ĝi firme enradikiĝis en la lingvo kiel esperantismo. Mankas en Esperanto simpla, unuvorta sinonimo aŭ ekvivalento por la koncepto enestanta en “krokodili”, do tiu eks-slanga vorto jam de longe akiris la rajton de civitaneco en la lingvo. Pro la sama manko en etnolingvoj, “krokodili” ne estas tradukebla, do estas necese klarigi ĝin per plurvorta frazo:

angle: “... speak one’s national language where Esperanto would be appropriate...” (Wells, 1969)

france: “... parler en langue nationale dans une réunion espérantiste...” (Waringhien, 1976)

Eĉ pli rimarkinda fenomeno estas la depruntado de tiu esperantismo, aŭ pli ĝuste, ĝia signifo, por apliki ĝin al etnolingvaj vortoj signifantaj “krokodilo”. Jen tri ekzemploj:

ĉeĥa: “Pár slov o krokodýlování...” (STARTO, 1991/147, p. 17).

franca: “... pour éviter que l’espéranto se dialectalise, on a plus besoin de crocodiles que d’académiciens...” (François Lo Jacomo, 1981).

portugala: “Do marasmo crocodilante em que se encontrava então a nossa Associação...” (NIA BULTENO, 1991/54, p. 22).

Kompreneble, tiuj tekstoj havas sencion nur por esperantistoj. Ili diras nenion al gaĝo. □

Bernard Golden,

naskiĝis en 1925, usonano, universitata bakalaŭro pri lingvoj (modernaj kaj klasikaj) kaj arto, magistro pri antropologio kaj arkeologio. Ekklernis Esperanton en 1946 kaj “edzperantistiĝis” en Hungario en 1971, kie li ade loĝas. Akademiano, la plej aktiva artikolisto en Esperantujo. Verkas ĉefe pri lingvaj demandoj kaj historio de la E-movado. Pri interlingvistiko kaj planlingvistiko publikigis ankaŭ angle en ne-Esperantaj fakrevuoj. Ofta premiito en internaciaj beletraj konkursoj, verkis teatraĵojn kaj tradukis. Aŭtoro de la prilingvaj libroj *Marĝene de la lernolibro* (1982) kaj *Komplete al la lernolibro* (1990), de la novelaroj *Hieraŭ – hodiaŭ - morgaŭ* (1982) kaj *Bestoj kaj homoj* (1987), de la krimrakonto *Infero en aŭtuno* (1993), la sciencfikcia romaneto *Ŝamanoj en la kosmo* (1994) kaj la teatraĵoj *Antaŭ la kulisoj* (1994).

Notoj

- (1) István Szerdahelyi. Pri la slango de TEJO-anoj. *DER ESPERANTIST*. 1971, n-ro 48, p. 6-7.
- (2) Jean Thierry. Lingvo-niveloj. *LA LETERO DE L’AKADEMIO DE ESPERANTO*. 1991, n-ro 14, p.2.



Ikonoj en Rusio

— Irina Aleksejeva, Rusio



"Ne priploru min, Panjo" de Aleksandro Donskoj

Iam ikonopentrejoj ekzistis en preskaŭ ĉiu urbo, en ĉiu monaĥejo ĉe ni. Sed dum la 70 lastaj jaroj Rusio estis lando de ateismo kaj pro tio multege da temploj kaj monaĥejoj estis detruitaj. Ikonopentristoj, kompreneble, restis sen laboro. Multaj el ili devis forlasi la landon, kaj kelkaj aliaj trafis en malliberejojn. Tiam ŝajnis, ke ikonopentrado entute malaperas, je la dua fojo. Antaŭe caro Petro la Unua likvidis la ikonopentrejojn de Armila Palaco en Kremlo.


Komence de 1970 en la tre fama monaĥejo Troice-Sergieva Lavra de urbo Sergiev Posad, iama Zagorsk, monaĥino Juliana fondis la unuan niatempan lernejon pri tradicia ikonopentrado. En 1988, post sep jardekoj da malpermeso, fine oni oficiale aprobis la praktikadon de la arto. Denove malfermiĝas temploj kaj monaĥejoj, kaj la bezono de ortodoksaj ikonopentristoj estas evidenta.

Antaŭ nelonge estis aranĝita en Moskvo la unua ekspozicio pri modernaj ikonoj. Ĝin organizis novfondita societo "Izograf", kiu renaskas la malnovajn tradiciojn de tiu templa arto aperinta inter la 11a kaj 12a jarcentoj.



"Dia patrino" de Aleksandro Rudoj

Estus erare opinii, ke la verkoj de la nunaj ikonopentristoj estas nur kopioj de la malnovaj. Ĉiu artisto volas trovi sian propran stilon, sed konservante la tradiciojn.



"Savanto" de Aleksandro Rudoj

Tiaŭanako

sola ĉe la Pordo de l' Suno

— Atiljo Orellana Rojas, Argentino


Nur 20 kilometrojn for de la lago Titikako, sur la plata ebenaĵo, kiun dividas Bolivio kaj Peruo, je 3 840 metroj super la marnivelo, troviĝas Tiaŭanako, unu el la plej misteraj lokoj de nia tergloblo.

Tiaŭanako etendiĝas en vasteco de 420 hektaroj. Tute soleca pejzaĝo estas la kadro por regiono ĉirkaŭata de montoj, kies alteco varias inter 4 700 kaj 6 000 metroj. Tia medio ne ŝajnas esti la plej taŭga por disvolviĝo de tre evoluinta civilizo, tamen...

La plej elstara monumento en Tiaŭanako estas la Suna Pordo, grandega ŝtono dekoraciita per ĉizaĵoj, kies belaj reliefaĵoj montras elstare la ĉefan dion: la Sunon. Krom tio troviĝas restaĵoj de temploj (unu piramida kaj alia subtera), palaco, plurnombraj domoj kaj imponaj idoloj detale ĉizitaj.

Kiam la hispanoj alvenis la tuto estis ankoraŭ multe pli interesoveka, sed tertremoj, oftaĵo en la regiono, kaj la daŭra forpreno de la ŝtonoj de la konstruaĵoj flanke de la koloniistoj por starigi siajn proprajn domojn, kontribuis al senpaŭza detruado. Nur la plej grandaj ŝtonoj restis sialoke.

La ora epoko de Tiaŭanako datiĝas de la periodo inter la jaroj 800 kaj 1 000 de nia erao, kiam, laŭ studoj faritaj, la tiea loĝantaro nombriks proksimume inter 30 000 kaj 40 000 homoj. Tiam, ĉi tiu imperio kaj tiu de Huari, situanta iom pli norde, regis la tutan andan regionon de la hodiaŭaj Peruo kaj Bolivio. La religio baziĝis sur la kulto al dio Suno kaj ĉi tio forte ligiĝis al politika administrado.



La lago Titikako, inter la nunaj teritorioj de Peruo kaj Bolivio.



Kun la hispanoj alvenis la demando pri la antikveco de Tiaŭanako. La tiamaĵ indianoj ne kapablis klare informi pri tio: laŭ iliaj legendoj la urbo estis konstruita de gigantoj en unu nokto antaŭ la Granda Diluvo, sed ĝi estis poste detruita de fortega tertremo kaj la radioj de dio Suno. Hodiaŭ, tamen, kaj dank' al tre seriozaj studoj oni scias, ke la imperio naskiĝis antaŭ 300 000 jaroj. Diversaj fosadoj faritaj dum nia jarcento kaj studoj per karbono-14 permesas konkrete scii, ke estis 4 fazoj en la vivo de Tiaŭanako:

- a) stariga (de proksimume la jaro 1000 a.K. ĝis 133 p.K.)
- b) urba (133 p.K. - 374 p.K.)
- c) imperia (374 - 724)
- ĉ) ampleksiga (724 ĝis la 13-a jarcento)

Kiam la inkaaj militistoj invadis Tiaŭanakon, meze de la 15-a jarcento, estis pasintaj jam pli ol 250 jaroj, de kiam la urbo estis komplete morta. Malmulton oni konas pri la ĉiutaga vivo de Tiaŭanako, tiel ĝia pasinteco restas vualita meze de legendoj kaj onidiroj.


Por multaj estas granda mistero, ekzemple, la transportado de monolitaj el andesito, vulkana ŝtono kun ruĝa sablo, kiu utilis por konstrui la monumentojn kaj skulpti la idolojn. La plej peza el ĉi tiuj lastaj pezaroj 131 tunojn. En la duoninsulo Copacabana [kopakabana], ĉe la lago Titikako, je 80 kilometroj de Tiaŭanako, troviĝas la sama ŝtono, kaj, do, ĉiam venas la demando: kiel eblis transloki pezajn blokojn tra tiom da kilometroj? La lokaj legendoj mencias iun sorĉiston, kiu flugigis la ŝtonojn dank' al muziko ludata per kenao*. Sed la scienco, siaflanke, analizis la faktojn.

La bolivia arĥeologo Carlos Ponce Sangines sukcese pruvis, ke 20 homoj kapablas transportadi 1 tunon uzante ian indianan teknikon. La arĥeologo asertis, ke la blokoj estis puŝitaj de pluraj homoj kun la helpo de fortaj ŝnuroj faritaj el lokaj herboj. Tiel oni portadis ĉion ĝis

la lagobordo. La blokoj el andesito estis poste transportataj sur lignaj boatoj trans la lagon ĝis la loko de sia definitiva instaligo. La transportado de la plej grandaj blokoj, tamen, restas ankoraŭ senresponda.

Ekzistas ankoraŭ pliaj misteroj: evidentiĝas, ke la urbon ties loĝantaro forlasis subite. Kial? Ankaŭ nesciata restadas ankoraŭ la funkcio de la urbo: ĉu religia centro, ĉu administra ĉefurbo? Ĝis nun nenio permesas ian respondon doni. Kaj daŭre Tiaŭanako kuŝas soleca, kaŝante silente siajn sekretojn tie alte en Andoj, lulata per melodio de kenaoj, pinkuljoj* kaj sikuoj*.

kenao: Anda fluto, konsistanta el kano kun 5 truoj, en kiujn oni lipe blovas tra truo troviĝanta en unu el ĝiaj ekstremoj
pinkuljo: Anda muzikilo, konsistanta el longa tubo, en kiun oni blovas tra truo troviĝanta en unu el ĝiaj ekstremoj
sikuo: Anda Pajno-ŝalmo, konsistanta el serio da diverslongaj kanoj



La Pordo de l' Suno, restaĵo de la kulturo de moĉikoj, kiuj mistere malaperis pli ol 250 jarojn antaŭ ol inkaoj venis por submeti ilin.

Eĉe ĉiu ajn infano, kiu sekvas literaturajn modfluojn, scias, kiu estas Karlo Skatolo.

Ĉar Karlo Skatolo estas la fondinto de la multe diskutata literatura skolo, meztulepramismo.

Oni pafis la starton de meztulepramismo – se oni povas tiel vortigi – je tiu vespero, kiam premieris la dramo “Vidvino de fianĉo – meztuleprameska tragedio”, verkita de Karlo Skatolo.

La intrigo kaj temo de la teatraĵo ne estis speciale rimarkindaj. Supraĵe rigardate preskaŭ ordinara popol-dramo: Viro, kiu amas junulinon, kiu tamen ne amas lin, sed alian viron, kiu tamen ne amas ŝin, sed alian junulinon, kiu tamen ne amas lin, sed la unuan viron, kiu amas la alian junulinon. La dramo kulminas per sceno de geedziĝa festo kun interbatado kaj ponardado.

La premier-spektantaron la dramo efikis konfuze. La spektantaro ne sciis, ĉu ridi aŭ plori. Sed ĝi nenion kuraĝis fari antaŭ ol vidis kritikon. Antaŭ tio la publiko ja ne povus diveni, kiu estis tiu nova meztulepramismo reprezentata de la dramo, al kiu oni tial devis sinteni singarde.

MEZTULEPRA

Olli

— trad. Ilkka Santtila,
Finnlando

La kritiko sintenis interesite, eĉ fervore, al meztulepramismo: La dramo mem havis malfortaĵojn, sed ĝia meztulepramismo estis io nova kaj, preterpasante la tradiciajn modifojn, liberige lumiganta. Ĝi tamen estis en normiga senco malfacile analizebla, sed ĝia normouniverso motivigas la daŭrojn de realaj inhibicioj de la plej propra memo.

Diversaj kritikistoj difinis meztulepramismom tute alimaniere. La nova skolo ŝajne estis tiel nedefinite nebula aŭ flekseble elasta, ke la interpreteblecoj estis preskaŭ senlimaj.

Ĉiuokaze meztulepramismo fariĝis literatura modo. Ĉiu, kiu volis esti sin rigardata klera, konsideris necesa diskuti pri meztulepramismo – se pro la malfacileco de la aferoj nenion alian, tamen eĉ menciante tiun snoban vorton, kiu en si mem estis tiel malfacila, ke ĝiaj parkerado kaj prononcado postulis kaŝitan ekzercadon.

Naskiĝis meztulepramismaj kluboj. Pri meztulepramismo oni faris paroladojn, eseojn, disputojn, kaj naskiĝis plurspecaj meztulepramismaj skoloj kaj sektoj, same kiel la tutan ismon rigore kontraŭantaj antimeztulepramistoj. En modsalonoj oni elpensadis meztulepramismajn fasonojn al virinoj. Kompreneble aperis multaj malicaj ŝercoj pri meztulepramismo; por ĝojigi burĝulojn, kiuj tute ne komprenis meztulepramismom.

Oni eble demandus, kiel sintenis al la modfluo la kreinto mem, la aŭtoro de la meztuleprameska dramo, Karlo Skatolo?

Li dum longa tempo neniel sintenis. Lasinte sian dramon al la teatro kaj atendinte tri jarojn ĝian premieron, li laciĝis pro atendado kaj vojaĝis al Afriko, al Belga Kongo, por fariĝi traktoristo. Homo ja povas vivteni sin ankaŭ kiel aŭtoro – se oni scipovas uzi traktoron.

Finfine post jaroj al Karlo Skatolo en la fora Belga Kongo, en la distanca profundo de la ĝangalo, venis scio – pere de atentemaj impostaŭtoritatuloj – pri la sukceso de lia dramo.

Li entuziasmiĝis reveni al la hejmlando.

Ĉe la siphaveno lin atendis aro da intervjuantoj de gazetoj.

Antaŭ ĉio la intervjuantoj postulis de Karlo Skatolo diri ion pri meztulepramismo.

– Pardonu, diris Karlo Skatolo, mi estis for tiom longe. Mi tute ne konas la aferon. Kio ĝi estas? Kaj cetere, kiel singardema viro, mi tute ne volas miksiĝi kun politiko...

En la sekvonttagaj gazetoj oni rakontis: “Karlo Skatolo estas modeste modera, kiam ektemas pri lia meztulepramismo. Li repuŝas demandojn ludeme humure ekrespondante, ke li ŝajne nenion scias! Tamen li donas rimarkindan aludon, ke la meztulepramisma vidpunkto enhavas ankaŭ politikajn tendencojn.”

– Dio helpu, ekĝemis Karlo Skatolo al iu sia konato. Ĉi tio estas tute terura! Ĉiuj homoj kuras

OLLI

estas la pseŭdonimo de Väinö Nuorteva (1889-1967), verŝajne la plej fama aŭtoro de “babilrakontoj” en Finnlando. Li verkis dum 42 jaroj por la gazeto *UUSI SUOMI* kaj postlasis ĉ. 13 000 babilajojn. Li evoluigis

la stilon de “seka babilajo” ĝis nesuperebla pinto. Li estis satiristo, kiu senĉese mokis burokracion, stereotipajn sintenojn kaj stultaĵojn de la homoj. Ĝenerale estis pli gravaj al li la homaj ol la aktualaj temoj. Pro tio multaj liaj verkoj estas egale trafaj en ĉiu ajn epoko kaj lando. Tamen, ne ĉiujn liajn verkojn eblas traduki, ĉar en ili abundas lingvaj ludoj kaj stilparodioj, ekzemple mokado de la gazetara stilo.

Jam frue Olli kreis kelkajn famajn rolulojn, kiuj restis la samaj dum lia tuta kario. Eble la plej konata el ili estas la *nigrabarba viro*, kiu konstante rifuzas agi laŭ la “deca” maniero. Per tiu persono Olli dubigas multajn absurdajn fenomenojn en la socio – ekzemple la titoliĝemon de homoj. La pinton de la rakontoj li kutime lasas ĝis la fino, sed tute ne substrekas ĝin, kaj la leganto surpriziĝas kaj ekamuziĝas kompreninte mem la ideon. Ekzemple: “Ĉevalo estas tiel saĝa, ke ĝi nenion diras pri la aferoj de homoj. Ĝi nur

henas.”

Al la babilajoj de Olli esence ligiĝis humoraj ilustraĵoj de tri artistoj: Erkki Koponen (1899-), Topi Vikstedt (1891-1930) kaj Germund Paaer (1881-1950).



Olli intervjuata, aŭ desegno de Erkki Koponen

ILKKA SANTTILA

“Mi naskiĝis en 1967 kaj diplomiĝis en 1994 pri informadiko. Mi laboras en



granda komputil-firmao kiel programisto. Esperanton mi eklernis en 1988, plejparte aŭtodidakte. Mia E-agado inkludas engaĝigon de *ESPERANTA FINNLANDO*,

verkadon de krucvortoj por diversaj revuoj, kaj nuntempe ankaŭ tradukadon. Kiel oni povus diveni, mi ŝatas humuron, sed ĉar mi ne tre bone kapablas mem verki ŝercrakontojn, prefere mi tradukas.”

MISMO

post mi kaj premas kaj ĝenas min per tiu malbenita meks... lepr... mismo...

– Ha ha, diris la konato, eĉ vi mem ne povas prononci ĝin! Tute juste, kiu ordonis vin inventi tiaĵojn, kion almenaŭ mi tute ne komprenas, kvankam mi ne kuraĝas konfesi tion, por ke oni ne kredu min stultulo!

– Ho, bona amiko, mi ja ne povis antaŭvidi, ke mi estus inventinta tian mezt... leprismo...

– Sed ĉu vi ne mem verkis la dramon?

– La dramon. Kompreneble. Tute ordinaran dramon laŭ mia opinio. Simple laŭ unu vera okazintaĵo. Mi ne komprenas, ke ĝi enhavus tian... tiun diablan mestulebros...

– Do demandu de tiuj, kiuj komprenas!

– Ĉiuj ja ŝajnas ĝin kompreni, krom mi mem kaj vi. Ĉi-vespere estas aranĝita festeno kaj ili postulas, ke mi devus paroli pri tiu... tiu...

Forviŝante malvarman ŝviton de peno Karlo Skatolo turnis sin al doktoro Virulo. Kiu tamen ne estis kuracisto, sed fil. d-ro kaj laŭ publika opinio la plej lerta specialisto kaj evoluiganto de meztulepramismo.

– Sinjoro doktoro, diris Karlo Skatolo. Ŝajnas eble strange, ke mi, kiu estas la inventisto de meztulepramismo (mi jam lernis tiun malbenitan vorton!), petas la doktoron informi, mi celas klarigi al mi, kio ĝi fakte estas?

– Estas granda honoro, diris la d-ro, ke la fama kai



pamaso

Frato, mi venos

(Por tiuj, kiuj suferas malliberigadon pro sia konscienco)

Frato enfermita en la frosta fako de nokto sen eliro.

Via krimo: esti kontraŭinta la falsecon.

Via delikto: pensi, ke vivo estas egaleco.

Mi vidas la abismojn, kiuj sur via haŭto aperas malfermitaj; abismoj, tra kiuj la purpuraj akvofaloj penetras ĝis la interno de l' animo.

La mutilanta silento forkonsumas vin.

Via doloro tremigadas vin.

La doloro de vivaj Vortoj, ligataj.

Ho, viktimo en labirinto de l' mallumo.

Venu kaj spertu en mi vian metamorfozon.

Al viaj korpremoj mi liveros kokonon.

Ne plu iu metala araneaĵo estos

barilo por la anonco de VIAJ VORTOJ.

Ricardo Herrera Trigueros, Kostariko



de meztulepramismo mem volas aŭdi mian komprenon pri la meztulepramisma skolo.

La d-ro klarigis, ke li aprezas la meztulepramisman, kiel adekvate konstruantan sensadon de volodevena intensiveco, kiu duobligas kaŭze modifante la realiĝadon kaj transformadon de mem-instinkto al efektiva, inhibiciojn eliminanta vieco, kiu kiel celo de drama intenco estis vere neaŭdite nova.

– Sufiĉas! kriis Karlo Skatolo kaj ĵetis sin eksteren. Mi komprenas nenion! Tute vere absolute nenion! Ĉiuj homoj komprenas tiun mes-
tulepsisman kaj ĝenas min ĝis morto per ĝi, sed mi, mi mem, la majstro de metsulebranismo, ne povas kompreni, kio diable ĝi estas! Mi ne komprenas. Mi freneziĝas. Aŭ jam freneziĝis! For de ĉi tie!

Karlo Skatolo fuĝis reen al Belga Kongo per la sekvonta ŝipo. Definitive.

III

Bedaŭrinde Karlo Skatolo neniam eksciis, en kia maniero li naskis meztulepramisman. Nek la cetera mondo, antaŭ ol meztulepramismo kiel literatura modo jam malaperis al rapida forgeso.

La akuŝo estis okazinta jene:

Atendante la premieron de sia dramo Karlo Skatolo sendis telegramon al la teatreto por demandi jene:

“Kiam estos la premiero de mia teatraĵo.”

La telegrafistoj de Belga Kongo, kiel oni povas diveni, ne tre bone konas Esperanton. Tial la telegramo alvenis en la jena formo:

“Kaj meztuleprameska mia teatarjo.”

La teatreto kun asistantoj studis la telegramon.

Ili alvenis al jena konkludo: Karlo Skatolo verŝajne volas informi, ke tiu lia dramo – aĉeska cetere – estas “meztuleprameska”. Kio mirinda estas tio? Eble supozas Skatolo, ke per tia nomstrangaĵo li faras la dramon pli interesa! Nu, mi konsentas. Povas helpi reklamadon.

Kaj do la teatro metis en la reklamoj “Vidvino de fianĉo. – Meztuleprameska tragedio. – Verkita de Karlo Skatolo.”

Ami kinon:

Rapido

Originala titolo: *Speed*

(Usono, 1994)
(Kolora)

Reĝisoro: **Jan De Bont**

Cefroluloj: **Keanu Reeves,**
Dennis Hopper,
Sandra Bullock

Kvankam mi ne vere ŝatas rigardi furorfilmojn, ĉar multaj el ili montras nur sencelajn mortigadojn, riverojn el sango kaj similaĵojn, kun tiu ĉi nova filmo de 20-th Century Fox (kies eŭropa premiero okazis en la moskva kinejo "Rossia") kun tute simpla nomo, *Rapido*, okazis alie. Mi ne multe sciis pri ĝi antaŭ ol eniri la kinejon. Sed poste mi opiniis, ke ĝi plene pravigas sian nomon.

La ĉefa heroo estas la speciala policano Jack (Keanu Reeves). La tutan filmon li bataladas kontraŭ iom freneza emerita eksplozivistoj (Dennis Hopper), kiu minis la veturon de aŭtobuso tiel ruze, ke la eksploda mekanismo ekaktiviĝas, kiam la aŭtobuso ekhavas la rapidecon de 50 mejloj aŭ malpli hore. Tiel vi komprenas, ke la malfeliĉa buso kun pasaĝeroj kaj policisto (li ja devas helpi ilin) kontraŭvole veturegas laŭ la urbaj stratoj. Kondukas la transportilon hazarda stiristo, la bela junulino,

Emmy (Sandra Bullock), anstataŭ la vundita stiristo.

Rapido estas la debuta laboro de Jan de Bont kiel reĝisoro, kvankam li tute ne estas novulo pri kinaj aferoj. Ĉu vi vidis la famajn *Mortu dure* (*Die Hard*), *Mortarmilo 3* (*Lethal Weapon 3*) aŭ *Baza instinkto* (*Basic Instinct*)? Jan De Bont estis ilia ĉefa kameraisto. Prave do, ke ĉe *Rapido* oni bone rimarkas, ke la reĝisoro estas mem kameraisto. Jan De Bont fotis mem multajn el la bele faritaj scenoj. Tre impresis min la sceno pri salto de la aŭtobuso.



Rapido estas la debuta laboro de la brila kameraisto Jan De Bont kiel reĝisoro.

Entute la filmo estas plena de streĉo kaj rapido. Se vi vidis kaj memoras *La fuĝulo*, kie estas sceno de fervoja akcidento kaj kie la heroo (Harrison Ford) forkuras de la lokomotivo, nun imagu ke la tuta *Rapido* esta tia laŭ travivaĵoj kaj ŝtreĉo.

Verdire mi tre ŝatus scii, kio plaĉis al mi pli, ĉu la aktorludado, la bonegaj specialaj efektoj, aŭ simple trasentadi streĉon. Por satigi mian dubon mi denove rigardos *Rapidon*.

Irina Aleksejeva, Rusio

Libro:

Surprizo malantaŭ la muro

Malantaŭ la muro – puzleroj pri Ĉinio. Sabira Ståhberg.


Tokio: Internacia Kultura Laborejo, 1994. 72+6p. 21cm. Ilustrita. Prezo: 18,00 gld.

Sabira vojaĝis je la unua fojo al Ĉinio okaze de la UK en Pekino en 1986, kiam ŝi aĝis 18. Sola. "Mi fakte povintus en tiu restado juri al mi ke mi ne plu veturos al tiu ĉi loko, kie estis tiom varmege kaj tiom strange, kaj krome, ke mi ne lernos la ĉinan", ŝi asertis tiam. Sed tamen la misteraj vivovojoj kondukis ŝin al aziaj studoj, kaj poste ŝi komencis fakiĝi pri la ĉinaj lingvo kaj kulturo. Ŝi revenis al Ĉinio fojajn kaj fojajn, kaj pasigis tutan studjaron en Tajvano. Ĉu ĉiu studento pri aziaj studoj tiom tremiĝas en la azia spico, mi dubas, sed en tiu ĉi kazo ne povus esti aliel. Sabira estas de tia tipo, kiu neniel kontentiĝus pri la tedaj katedroj, ĉe kiuj ripetado senĉesa estas la sola maniero lerni la ĉinan. Ŝi decidis alfronti la malpuregajn stratojn plenajn de homoj, penetri la internon de la "sovaĝa" Ĉinio, kie oni neniam vidis "grandnazulon", obstine elprovizian 500-vortan bazan ĉinan lernitan en helsinka klasĉambro. Kaj, kvankam la "rondo familia" ĉiam helpis al Sabira en ŝiaj kontaktoj en Ĉinio, ŝi ja ĉiam vojaĝis sola. Entute ŝi vizitis Ĉinion sesfoje, kaj oni neniam scias, kiam ŝi revenos... al Eŭropo.

Malantaŭ la muro tamen ne estas vera vojaĝlibro; ĝi konsistas el fragmentoj de spertoj, dismetitaj iom puzlere, iom plezure, ne kronologie, sed tiel lerte, ke post la ellego de la libro oni perfekte enĉenigas la erojn por ekvidi la panoramon. Tuj en la komenco ŝi envagonigas la leganton per "Trajne", la unua ĉapitro, kaj dum la cetero de la libro ŝi montras Ĉi(n)on: La Ĉinion nuntempan, la konstruitan por okcidentaj turistoj, la Ĉinion de Konfuceo – kiun ŝi ne hezitas nomi "plendema maljunulaĉo kun longa barbo kaj stranga ĉapo", la Ĉinion de antaŭ la Kultura Revolucio, la Ĉinion de la Ming-dinastio kaj de la por ĉiam foririntaj taoistoj. Ĉion sen fanfaroni per siaj konoj de ĉinologio – male, ŝi ne timas eĉ ridindigi sin!

Certe tial oni dekomence sentas sin identigita kun ŝi kaj pretas komplici en ŝiaj aventuroj.

La rakonta kapablo de la aŭtorino estas laŭdinda. Kine, per scenoj, kiuj revenas en la pasinton aŭ antaŭeniras. Ĉio en ŝia tre propra stilo, mikso de humuro kun poezio kaj naivo, en simpla, klarega, "bona lingvo": "La foriro de Qingdao estis melankolia (...). La tuta aktora grupo kaj lokaj Esperantistoj venis al la stacidomo. Ĉiuj mansvingis kaj manpremis tra la trajnfenestro, unu post la alia plurfoje tiel ke miaj manoj fine doloris..." Ŝi bone sukcesas redoni la pejzaĝojn, revivigi la travivaĵojn kaj reaktivigi la sentojn: "... La soldato daŭrigas. Insultas, krias, ĝuas timigi la homojn. La homoj kunludas sed kiam li foriras, flugas insultoj tra la vagono. Tamen falas silento denove, la teoria silento, ĉar neniam tute silentiĝas. La trajno plue puŝas sin tra la nokto. Eterne survoje. Mi rigardas lunon. Kampojn. Homojn. Aero envenanta tra fenestro kirlas harojn, tukoj svingiĝas laŭ la trajnaj movoj..." aŭ "Malvarmas ankoraŭ, malvarmas en la forno malvarmas en la koroj de la elirantaj homamasoj sin reciproke puŝantaj. Ekmalvarmas mia korpo en mateno de Chongqing je la kvina horo. Malvarmas la pordo kiun mi malfermas por eliri..."



Malantaŭ la muro estas ilustrita per fotoj kaj desegnoj, provizita de mapo kun la indikoj pri la menciitaj lokoj, tabelo de terminoj kaj nomoj (ankaŭ en la ĉina), biografio de la aŭtorino kaj apendico kun fragmentoj de leteroj inter Sabira kaj la eldoninto, Yosimi Umeda – ĉu azia kutimo? Ankaŭ en la serio "iam kompletigota" de Ludovikito mi vidis tion. Ĉiukaze, tiuj postkulisaj povas esti interesaj, almenaŭ por tiuj, kiuj neniam rilatis al farado de libro aŭ revuo. Eble la sola mankonto, kiun mi rimarkis, estas tiu de enhavtabelo... aŭ ĉu eble mi ne bone komprenis, ke puzleroj ne bezonas tiajn formalajojn?

Antaŭ la eklego de *Malantaŭ la muro* mi certe estis analfabeto pri Ĉinio, kaj sendube post la ellego mi ne estas fakulo pri ĝi. Mi tamen certigu al vi, ke krom pasigi tre agrablajn horojn, mi ricevis plej plaĉajn lecionojn pri tiu grandega ŭjo, kiu entenas kvaronon de la monda homa vivo. Mi sincere dankas al Sabira kaj la eldonisto pro tiel brila enkonduko en la orientan mondon!

Franĉjo

Krucvorta Konkurso (Rezulto)

Ni ĝojas anonci, ke la krucvortan konkurson de *KONTAKTO* 143 (1994:5) partoprenis entute 10 homoj el 8 landoj. Lotume venkis HOUNNAKE K. Raoul el Togolando. Gratulon al li!

	P	U	K	I			
K	O	N	T	A	K	T	O
	Ŝ	U	O	J	A	R	
	T	L	S	T	E	L	O
P	I	L	K	O	N		
	S	I	A		S		
	T	A	N	Z	A	N	I
V	O	J	O	K	O	R	

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn.

Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

La angulo

Mia letero pri *La angulo de Ludmila kaj Petro*, KONTAKTO 144, (1994:6) estis iomete misa, eble pro miskompreno de la redaktoro. Mi skribis: "du seriojn da numervortoj, nome la intrinsekajn kaj la ĉin-devenajn" kaj la redaktoro komprenis: "du seriojn da numervortoj, nome la arabajn kaj la ĉin-devenajn". Mi intencis diri "proprajn al la japana lingvo", aŭ "uzatajn de la tempo de la prajapana lingvo", nome pri la numervortoj "hitocu", "hutacu", "mitcu" ktp. Ne temas pri la araba cifero kaj kompreneble ne temas pri la araba lingvo (japanoj ne estas araboj)... do "araba" ne taŭgas.

Mi skribis: "...cifero, kies nombro de literoj egalas al ĝia valoro" kaj mia opinio oni miskorektis (akuzativigo estas ĝusta): "ciferon, kies nombro da literoj egalas al ĝia valoro". Ĉar ĉi tie rekte temas pri la nombro, ne la literoj kalkulitaj per ĝi. Sed eventuale mi eraras, do kaptu akademian kaj demandu por certigi.

Ooŝida Takeŝi, Japanio

Red.: En la redakcio siatempe almenaŭ tri homoj okupiĝis pri la vorto "intrinseka", kiun ni ne konas en Esperanto kaj ankaŭ ne la diversaj vortaroj de ni konsultitaj. Bedaŭrinde ni miskomprenis vian celon.

Plej interesa

Mi gratulas vin por la daŭre alta kvalito de KONTAKTO: evidente necesas multe da laboro por produkti tiom ampleksan kaj interesan revuon – verŝajne la plej interesan, kiun mi abonas (kaj mi abonas kelkajn...)

Geoffrey Greatrex, Britio

Pri krucvorto

Laŭdegon al Ilkka Santtila pro la genie elpensita krucvorto de KONTAKTO 144 (1994:6), kies solvado iom longe okupis min. Ankaŭ *Kaŝitaj vortoj*, de Claus Günkel, laŭdindas!

Gerhard Kranl, Aŭstrio

Por la krucvorto de KONTAKTO 143 (1994:5) vi difinis la vorton "toskano" jene: "Havas kiel ĉefurbon Florencon". Laŭ PIV "toskano" estas la loĝanto, ne la regiono. Pli ĝusta difino eble estus: "Loĝanto de la regiono de Florenco".

Fabrizio Pagliaroli, Italio

Red.: Ni celis, ke la loĝanto, do la toskano, havas kiel ĉefurbon Florencon. Sed vi pravas, ni devintus esti pli klaraj. "Italo, kies regiona ĉefurbo estas Florenco" plej bonus.

"Fermitaj urboj"

Ankaŭ rusoj antaŭe malmulton sciis pri la "fermitaj urboj" kaj des malpli pri la homoj loĝantaj tie. Se vi rigardas la daton, en kiu la artikolo publikigita sub la nomo *Tro* en KONTAKTO 141 (1994:3) estis skribita, vi ja povas konstati, ke A. Minkin (tre populara kaj skandalema ĵurnalisto, cetere) verkis ĝin du jarojn antaŭe. Sed nun mi certigas al vi, ke nia vivo tre ŝanĝiĝis. Luj vivas pli bone, aliaj estas senlaboraj. Sed laŭ mia scio, tiu situacio ekzistas ĉie tra la mondo.

Paroli nun pri manko de nutraĵoj aŭ vestaĵoj estas tro malaktuala. Ankaŭ multe da eksaj fermitaj urboj nun malfermiĝas. Mi mem vivas en eksfermita urbo. Antaŭ kelkaj jaroj vi ne estus povinta trovi mian urbon eĉ sur la mapo de la Moskva regiono, kie mi loĝas! Mi, ekzemple, devis sendi miajn leterojn eksterlanden nur el Moskvo, ĉar leteroj senditaj el nia urbo ne alvenis al la adresato.

Estante mi volus vidi en KONTAKTO pli freŝajn informojn pri Rusio. Feliĉe nia vivo kaj malfeliĉe la prezoj rapide ŝanĝiĝas. Gazetaraj politikaj materialoj preskaŭ tuj eksmodiĝas.

Irina Aleksejeva, Rusio

SuperGeorgo

Mi protestas kontraŭ la uzo de "supernovo" anstataŭ la ĝusta "supernovao" en *La angulo de Ludmila kaj Petro* de KONTAKTO 144 (1994:6). Antaŭ ol uzi terminon oni kontrolu, ĉu ĝi troviĝas en PIV.

Georgo Kamaĉo, Hispanio

Gestuna ŝoko

En sia artikolo *Rajto je la parolo*, KONTAKTO 144 (1994:6), May Bijleveld pridemandas la bezonon ne nur de internacia gestolingvo kia Gestuno sed ankaŭ de gestolingvoj ĝenerale. En Britio ŝi sin trovas en eta minoritato, kiu sin kroĉadas al la ĉi tie eksmoda "nurbuŝismo". En lastatempa televida programo pri edukado de surduloj tre konvinke montriĝis, kiom pli bone estas uzi ĉiujn komunikrimedojn, ne nur liplegadon, kaj estis emocioge aŭdi la atestatajn de gejunuloj, kiuj estis spertintaj la metodojn de ambaŭ skoloj. Efektive, nuntempe en Britio la "nurbuŝismo" estas preskaŭ universale kondamnita de la spertuloj kaj respondeculoj pri surdula edukado, de surdulaj organizoj kiaj British Deaf Association (Brita Surdula Asocio) kaj Royal National Institute for Deaf

tre
facila

Mesaĝo por la edzo

Estis malfacila tempo en la hejmo de Ĝiĝjo Riĉi. Li estis kolera* al sia edzino, kaj ankaŭ ŝi al li. De multaj tagoj ili ne interparolis.


Unu vesperon, kiam Ĝiĝjo revenis hejmen, lia edzino rigardis televidon. Ĝiĝjo ne direktis la parolon al ŝi kaj eniris la dormoĉambron post trinko de glaso da lakto.

Kiam Ĝulja iris dormi ŝi trovis mesaĝon* sur la kapkuseno*. La mesaĝo en-havis jenon: "Ĝulja, veku* min je la sesa morgaŭ matene. Ĝiĝjo".

Kiam Ĝiĝjo vekigis en la sekva mateno estis preskaŭ la oka kaj duono. Li rigardis ĉirkaŭen kaj trovis alian mesaĝon ĉe la radio-horloĝo*. La mesaĝo diris:

– Veku Ĝiĝjon. Jam estas la sesa".

Elitaligis Cláudio R. Pistilli, Brazilo



Felipe Antero Lozano

horloĝo: maŝino, kiu montras la horojn
kap-kuseno: sako en la lito por la kapo
koleri: montri fortan malkontenton
mesaĝo: informo, kiun oni sendas al alia homo
veki: haltigi ies dormon; maldormigi

People (Reĝa Nacia Instituto por Surduloj), kaj de la surduloj mem.

Por sukceso en liplegado la plej bona situacio estas ĝuste tiu de la filino de sinjorino Bijleveld: denaska sed ne komplete surdeco de inteligenta infano, kaj bona instruado fare de konsciaj kaj inteligentaj gepatroj kaj instruistoj. Bedaŭrinde tia situacio estas relative malofte trovebla.

Sinjorino Bijleveld skribis: "... por kio taŭgas internacia [gesto]lingvo?... Por vojaĝi[?] ... sed multaj el ili [la surduloj] ne estas riĉaj." Implicita konkludo: internacia gestolingvo ne havas valoron. Ke esperantisto tiel pridemandu la eblan utilecon de Gestuno vere ŝokis min. Ofte okazas internaciaj renkontiĝoj de esperantistoj, ĉu ne? Sed multaj el ni, esperantistoj, ne estas riĉaj...

Ĉiukvarjare okazas internacia surdula kongreso. Kial ne? Ili havas komunajn problemojn, reciprok

simpation kaj komprenemon, iagrade ankaŭ komunajn interesojn. Sed sen internacia gestolingvo, dum la kunsidoj devas okazi samtempa interpretado fare de pluraj gestolingvistoj, same kiel ĉe kunsidoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Eŭropa Parlamento. Krome la surdaj kongresanoj el diversaj landoj nek per lipoj nek per gestoj povas babili, kiel en internaciaj E-renkontiĝoj.

Mi konsentas, ke gestolingvo ebligas komunikadon ne nur inter tiuj, kiuj konas ĝin, kaj ke ĝi do povas servi kiel rekta komunikilo inter la mondoj surdula kaj aŭdula. Ĝuste tial la liplegado kompreneble havas sian tre gravan rolon. Tio tamen ne estas argumento kontraŭ la samtempa ellerno de gestolingvo, kiu sialoke povas ludi utilan rolon en la larĝigado de la horizontoj de surduloj, same kiel Esperanto en la larĝigado de la horizontoj de kaj surduloj kaj aŭduloj.

Vilhelmo Rowe, Britio

Kiel verki per facila lingvo?

Kiam vi verkas por komencantoj, ne pensu: "Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?" – Vi devas pensi: "Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?"

Se vi spertos problemojn, vi eble trovos ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Sed memoru: la redaktoro pli facile povas simpligi interesan artikolon ol aldoni interreson al simpla sed banala materialo. Do, se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi vian lingvouzon, bonvolu tamen sendi la artikolon.

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

Facileco: La facillingvaj artikoloj de *Kontakto* aperas en la niveloj:

Tre facila: Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de "Aldone". Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klarigi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.

Facila: Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. Aliajn necesas klarigi.

Longeco: Longegaj artikoloj timigas komencantojn! Do preferu ne verku per pli ol proksimume 800 vortojn. Se vi opinias ke tiu longeco tro limigas vin, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde, anstataŭ provi kovri la tutan kampon.

Stilo: Uzu simplajn frazostukturojn kun kutima vortordo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verban substantivon se eblas uzi verbon anstataŭe.

Gramatiko: Je la nivelo 2 jam estas uzata la tuta baza gramatiko, sed je la nivelo 1 oni ne uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo *-anto*, necesa en tiaj vortoj kiaj *leganto*, *prezidanto*, *komencanto*, k.s.).

Kunmetaĵoj: Ne estas fiksita regulo pri la uzo de streketo por dividi kunmetitajn radikojn. La redaktoro aldonos streketon kiam tio ŝajnos necesa por ke la senco de kunmetaĵo estu klara.

Nomoj: Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne esperantigu propran nomon mem, sed uzu Esperantan nomon nur se ĝi jam efektive ekzistas.

Prefere uzu nacilingvan (latin-alfabetan) formon, aldonante interkrampoj la prononcon.

a bon-
acet-
adres-
aer-
afabl-
aferr-
ag-
agrabl-
ag-
ajn
akcept-
akr-
aktiv-
akv-
al-
alimenaŭ
alt-
am-
amas-
ambaŭ
amik-
amuz-
angul-
ankaŭ
ankoraŭ
anonc-
anstataŭ
antaŭ
apar-
apart-
aparten-
apenaŭ
aper-
apud
aranĝ-
arb-
art-
artikol-
asoci-
aspekt-
atak-
atend-
atent-
ating-
aŭ-
aŭd-
aŭskult-
aŭtobus-
aŭt(omobil)-
aŭtun-
av-
azen-

Baldaŭ
ban-
bar-
bat-
batal-
baz-
bedaŭr-
bel-
best-
bezon-
bibliotek-
bicikl-
bier-
bild-
bilet-
bird-
blank-
blov-
blu-
bol-
bon-
bord-
botel-
bov-
brak-
bril-
bros-
bru-
brul-
brun-
brust-
buŝ-
buter-
buton-

Cel-
centr-
cert-
ceter-
cigare-
cirk-
Camb-
ĉapel-
ĉar-
ĉe-
ĉef-
ĉemiz-
ĉes-

danc-
dang-
dank-
daŭr-
de-
decid-
defend-
dekstr-
demand-
dens-
dent-
desegn-
detal-
dev-
dezir-
di-
diferenc-
difin-
dik-
dir-
direkt-
disk-
diskut-
divers-
divid-
do-
doktor-
doĉ-
dolor-
dom-
domaĝ-
don-
donac-
dorm-
dors-
drat-
dub-
dum-
dung-

eben-
eĉ-
eduk-
edz-
efektiv-
efik-
egal-
ekonomi-
ekskurs-
ekspozici-
ekster-
ekzamen-
ekzerc-
ekzist-
el-
elekt-
elektr-
en-
energi-
erar-
esper-
esplor-
esprim-
est-
estim-
eventual-
evolu-

facil-
faden-
fajr-
fak-
fakt-
faktur-
fal-
fam-
famili-
far-
fart-
farti-
feliĉ-
fenestr-
fer-
feri-
ferm-
fest-
fiks-
fil-
film-
fin-
fingr-
fiŝ-
fiŝ-
flag-
flank-
flav-
flor-

ĉeval-
ĉiel-
ĉirkau-
ĉu

flug-
foj-
foli-
fond-
font-
for-
forges-
fork-
form-
form-
fort-
fos-
fot-
frap-
frat-
frat-
frül-
freŭd-
fren-
frez-
freŝ-
frost-
fru-
frukt-
fulm-
fum-
funkci-
fuŝ-

gaj-
gajn-
gas-
gast-
gazet-
glaci-
glaci-
glit-
grand-
gras-
gratul-
grav-
gren-
griz-
grup-
gust-
gvid-

garden-
gen-
general-
gentil-
gis-
goj-
gu-
gust-

ha
halt-
har-
haŭt-
hav-
haven-
hejm-
hel-
help-
herb-
hier-
histori-
ho-
hodiaŭ-
hom-
hor-
horloĝ-
hotel-
hund-

ide-
ideal-
imag-
imit-
industri-
infan-
inform-
insekt-
insign-
instru-
insul-
inteligent-
inter-
inter-
interes-
intern-
invit-
ir-

ja
jam
jar-
je-
jen-
jes-
juĝ-
jun-
jup-
just-

kadr-
kaf-
kaj-
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kapabl-
kapt-
kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke-
kelk-
kilogram-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komisi-
komitat-
kompar-
komp-
komp-
kompren-
komput-
komun-
komunik-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ-
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom-
kruel-
krur-
kudr-
kuir-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun-
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-

labor-
lac-
lag-
lakt-
land-
lang-
larĝ-
las-
last-
laŭ-
lav-
lecion-
leg-
legom-
leĝ-
lern-
lert-
leter-
lev-
liber-
libr-
lig-
lign-
lim-
lingv-
lini-
lip-
list-
lit-
liter-
literatur-
loĝ-
lok-
long-
lud-
lum-
lun-

man-
manĝ-
manier-
mank-
mantel-
mar-
mark-
marŝ-
mastr-
maŝin-
maten-
material-
mebl-
medi-
mem-
membr-
memor-
mend-
merit-
met-
metal-
metod-
metr-
mez-
mezur-
miks-
milit-
minus-
minut-
mir-
modern-
mok-
mol-
moment-
mon-
monat-
mond-
mont-
montr-
morgaŭ-
mort-
mov-
mult-
mur-
muŝ-
muze-
muzik-

naci-
naĝ-
nask-
natur-
naz-
ne-
nebul-
neces-
neg-
nek-

nep-
nep-
neŭtral-
nev-
nigr-
niv-
nukt-
nom-
nomb-
nord-
normal-
not-
nov-
nu-
nub-
numer-
nun-
nur

obe-
objekt-
odor-
ofic-
oft-
okaz-
okcident-
okul-
okup-
ol-
ole-
onkl-
opini-
or-
ord-
ordinar-
ordon-
orel-
organiz-
orient-
original-
ost-
ov-

pac-
pag-
pag-
pak-
palp-
pan-
pantal-
paper-
par-
pardon-
park-
parol-
part-
pas-
paŝ-
patr-
pec-
pen-
pend-
pens-
pen-
per-
perd-
perfekt-
period-
permes-
person-
pet-
pez-
pied-
pik-
pilkl-
plaĉ-
plafon-
plan-
plank-
plant-
plast-
plej-
plen-
plend-
plezur-
plor-
plu-
plum-
plur-
plur-
pluv-
po-

poem-
poent-
poezi-
police-
politik-
pont-
popol-
popular-
por-
pord-

kvadrat-
kvalit-
kvankam-
kvant-
kvazaŭ

quadr-
kaf-
kaj-
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kapabl-
kapt-
kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke-
kelk-
kilogram-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komisi-
komitat-
kompar-
komp-
komp-
kompren-
komput-
komun-
komunik-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ-
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom-
kruel-
krur-
kudr-
kuir-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun-
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-

quadr-
kaf-
kaj-
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kapabl-
kapt-
kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke-
kelk-
kilogram-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komisi-
komitat-
kompar-
komp-
komp-
kompren-
komput-
komun-
komunik-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ-
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom-
kruel-
krur-
kudr-
kuir-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun-
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-

quadr-
kaf-
kaj-
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kapabl-
kapt-
kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke-
kelk-
kilogram-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komisi-
komitat-
kompar-
komp-
komp-
kompren-
komput-
komun-
komunik-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ-
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom-
kruel-
krur-
kudr-
kuir-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun-
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-

rad-
radi-
rajt-
rakont-
rand-
rang-
raport-
raport-
redakt-
reg-
region-
regul-
reg-
raklam-
rekomend-
rekt-
religi-
renkont-
respond-
rest-
revu-
rezult-
ricev-
riĉ-
rid-
rigard-
rilat-
rimark-
rimed-
ripet-
ripoz-
river-
riz-
rob-
roman-
romp-
rond-
roz-
rubrik-
ruĝ-
rul-

saf-
ŝajn-
ŝanc-
ŝanĝ-
ŝat-
ŝerc-
ŝip-
ŝir-
ŝlos-
ŝnur-
ŝrank-
ŝtat-
ŝtel-
ŝtof-
ŝton-

sag-
sak-

sag-
sak-

tabl-
tabul-
tag-
tamen-
tas-
task-
taŭg-
te-
teatr-
tegment-
tekst-
telefon-
teler-
televi-
tem-
temp-
ten-
teori-
ter-
terur-
tim-
tir-
ton-
tra-
tradici-
traduk-
traf-
trakt-
tranĉ-
trankvil-
trans-
tre-
trink-
tro-
trov-
tru-
tuj-
tuk-
turism-
turist-
turn-
tuŝ-
tut-

uni-
nivers-
universitat-
urb-
util-
uz-

vagon-
valid-
valor-
varm-
vast-
vek-
ven-
vend-
venk-
vent-
ver-
verd-
verk-
vesper-
vest-
veter-
vetur-
viand-
vic-
vid-
vigil-
vilaĝ-
vin-
vintr-
vir-
viŝ-
vitr-
viv-
vizaĝ-
vizit-
voĉ-
voj-
vojaĝ-
vok-
vol-
volv-
vort-
vost-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

zorg-

Aldone uzeblas la oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag- kaj monatomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj, kaj la plej konataj mallongigoj.